



Turlanda Esperanta Kulturcentro
7 Toulouse Lautrec strato
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavo	Paĝoj
En sia nova romano, Cynthia Kafka rakontas al ni la renkontiĝon de kvar vojaĝantinoj en trajno kaj dezirigas dividi ties vojaĝon.	1 kaj 2
Ĉu vi konas la parizajn zinkistojn ? Ne. Tiukaze, legu tiun artikolon, kiu malkovrigos al vi malmulte konatan metion.	3
Kiam ni estas infano, ni estas kelkafoje maljustaj al niaj gepatroj kaj ni eĉ povas vundi ilin. Tio estas la temo de tiu mallonga rakonto.	4 kaj 5
Dum niaj promenadoj sur la kamparo aŭ en la arbaroj, ni malofte atentis pri la plantoj de nia regiono. Tiu artikolo prezentas unu el ili : la venusan umbilikon.	6 kaj 7
Prezentado de la sudkorea artistino Yeesookyung, specialistino pri la kintsugi, japana arto, kiu reparas ceramikaĵojn per oro.	8

Romano. Au train où va la vie (Laŭ la fluo de la vivo).

La nova romano de Cynthia Kafka komenciĝas en la Montparnasse stacidomo, kie kvar vojaĝantinoj envagoniĝas en la saman altrapidan trajnon al Hendaye. Longa vojaĝo subite interrompita, kiam violenta ŝtormo kuŝigas arbon sur la trakon.

« Stacidomo estas vastega sceno, sur kiu ĉiu ludas sian partituron », Eliane memoras pri tiuj kelkaj vortoj, kiam ŝi paŝegas tra la forveturhalo de la Montparnasse stacidomo, apogite sur sia marŝbastono kaj trenante sian malmodernan valizeton. Eliane regule prenas la Paris – Hendaye trajnon. Plie la okdekjarulino estas bone konata de Patrick, biletkontrolisto, kiu tiun tagon preparas sin emeritiĝi.

La maljuna sinjorino malfacile resaniĝas pro la forpaso de Jacques, la amo de sia vivo. Kiam ŝi sidiĝas sur sian sidlokon, en porfamilia spaco de la 17a pasaĝervagono, ŝi trovas tri nekonatinojn : Betty kaj Pénélope, du fratinoj, kiuj perdis sin el la vido de longe kaj kies troviĝo estas motivita pro sanproblemoj de sia patro. La unua, ĉirkaŭ kvindekjara, laboras en Ehpad (Establo hospitala por maljunuloj dependaj) de la regiono. La dua karieradas en la luksa hotelindustrio, kiu kondukas ŝin en palacojn en ĉiuj anguloj de la mondo.

En la trajno ankaŭ troviĝas Lola, malproksimigita de

sia grupo da amikinoj, kun kiuj ŝi estis pasigonta unu semajnon da ferioj. Ŝiaj separatitaj gepatroj ignoras, kie ŝi estas. Turmentata de dubo, la juna virino ignoras, kion ŝi faros dum la venontaj tagoj. Baldaŭ la glacio disrompiĝas inter tiuj kvar virinoj, kiuj iom post iom malkovros al si reciproke tuŝpunktojn.

Pro malsamaj kialoj, ĉiu el ili travivas amamankon kaj restas sola por alfronti la ĉiutagaĵon. Unuvorte kvar solulinoj devenintaj de kvar generacioj de virinoj. Oni ne elektas sian familion, nek siajn trajnnajbarojn... sed kelkfoje hazardo estas bona gardo !

La kvieteco de la vojaĝo estas brutale interrompita, kiam grandega



Cynthia Kafka.

Cynthia Kafka

ŝoko kaŭzas la urĝan halton de la vagonaro :

« La pasaĝeroj havas la impreson trairi tunelon aŭ transiri la pordojn de la kvara dimensio. La malpli senmovigitaj valizoj falas surgrunden, libere ekruliĝas en la koridoro kaj kunbatiĝas, kiel se demonhavantaj. »


Eksa lerneja instruistino, Cynthia Kafka estis blogistino, redaktorino poste aŭtorino. Ŝi publikigas siajn unuajn romanojn per memeldono ĝis ŝi estas malkovrita de la eldonoj de la Archipel. Tie ŝi aperigis du romanojn : Je suis venue te dire (Mi venis por diri al vi) (2021), kaj Contre vents et secrets (Kontraŭ ventoj kaj sekretoj) (2022). Ŝiaj lastaj du libroj, Le sourire aux livres (Rideto al la libroj) (2023), laŭreato de la Charleston Poche premio, kaj Pour qu'elle revienne (Por ke ŝi revenu) (2024), aperis ĉe Charleston.

Per sia libro *Au train où va la vie* (Laŭ la fluo de la vivo), Cynthia Kafka sukcesas, kun humuro kaj tenereco, entrajnigi nin kaj dezirigas al ni dividi la vojaĝon de tiuj kvar personoj. Kiel diras unu el ili : *kunmetu kvar gesolulojn en porfamilian spacon, skuu iomete la vagonaron, lasu ilin eliri plensune... kaj vi vidos, kiel ili amikiĝas !* »

La verkistino ankaŭ donas al la leganto perfektan demonstron de la teorio de la ses gradoj de separado. Tiu ĉi kredas ebla, ke ĉiu persono sur la planedo povas esti kunligita kun iu ajn alia tra ĉeno de individuaj rilatoj, kiuj limiĝas je ses manpremoj.

Tiun recenzon de Samuel DELZIANI esperantigis Jean-Mary Simonet.

Au train où va la vie de Cynthia Kafka. Editions Charleston. (2025) Prezo : 19 eŭroj.



La parizaj zinkistoj honoritaj

La lerteco de tegmentistoj-zinkistoj parizaj estis registrita en la kultura nemateria heredaĵo de Unesko en decembro 2024. Unu el ili, Yoni Niglio, sin konfidas.

La tegmentoj de la luma Urbo estas konstituitaj el 80% de zinko.


Oni ne vidas ilin tiom ili supreniras, tamen, ili nepras al la pariza pejzaĝo. La tegmentistoj-zinkistoj konservas en bona stato la tegmentojn de la luma Urbo konstituitajn preskaŭ el 80% de zinko. « *Esti trankvila sur sia tegmento estas sento iomete paradiza*, asertas Yoni Niglio, respondeculo de la entrepreno Ĉielblua Tegmento. *Ni estas lasitaj al ni mem kaj al la naturaj elementoj.* »



Yoni Niglio.

Aldoni pli da beleco

Tiu lerteco aperinta en la XIXa jarcento, en la epoko de la barono Haussmann estas de nun klasita en la kultura nemateria heredaĵo de Unesko. « Estas bonega afero, ĝojas tiu, kiu alvenis en tiu metio iomete hazarde, kaj kiu rapide pasiĝis por la profesio. Oni havas ankoraŭ *la epokajn ilojn : amboso, martelo por ardezo ...Tiu rekono disvolvos la belecon de tiu profesio.* »



Kun la kapo en la nuboj, la tegmentistoj-zinkistoj komencas per kompleta renovigo, kiu konsistas en la malmunto de la zinko, la tegolo aŭ la ardezo. « *Poste, oni ŝanĝos la subtegolajn latojn – la ligna parto, kiu subtenas la tegmentan kovraĵon- kaj metos novan zinkon naturan aŭ kvarcon* » klarigas Yoni Niglio. Laboro detalega, tre logika kaj geometria, kie la metiistoj prilaboros denove la materialon, por ke ĝi perfekte adaptiĝu al la tegmentaj formoj. Por Yoni kaj la aliaj, nenio krom pluvegoj aŭ ekcesaj varmegoj povas malpermesi al ili soriri cele al ĉielo. « *Kiam oni estas sur la tegmentoj, oni pensas, ke oni kreos aĵojn por alporti suplementan belecon al tio, kio jam ekzistas, li konkludas. Estas metio tre kompleta, kiu havas sencon. Oni metas stelojn en la okulojn, gardante la piedojn surtere.* »

Tiun artikolon el la revuo "le fil des ans" esperantigis Jeannine Layseman.

Mia maljuna patro de Chantal Sourire

Plej malbone estis, kiam li venis preni min el la lernejo. Hejme mi sukcesis ruzi, malpersvadante la kamaradojn, kiuj povus viziti min. Mi neniam estis malsana, neniu danĝero de tiu flanko, por la distraĵoj mi argumentis, ke nia apartamento estas tro malgranda por gastigi, kvankam mi vivis en ne malpli ol cent kvindek kvadrataj metroj. Mi iris ludi ĉe la aliaj, tiuj kiuj havas normalan patron. Kiam venis al li la deziro plezurigi min, li atendis min antaŭ la griza pordego de la



mezlernejo. Tiam mi bezonis ruzon kaj kuraĝon por uzi la eliron de la instruistoj, malgrandan kaŝpordon, kiu kondukis al la strateto. Akirinte kameleonan lertecon, mi laŭiris la senstukan muron antaŭ ol forkuri hejmen, kie, kun sincera vizaĝo, mi ludis surprizon. – Ne, mi ne vidis vin, bedaŭrinde. Ludante la hipokriton, mi povus entrepreni karieron.

Mia patrino neniam venis. Ŝin mi volintus vidi antaŭ la krado, mi ekvidintus ŝian silueton en la malproksimo, rapidigintus la paŝojn, ne kurante kiel infano, sed vigla kaj memfida. Por la okazo ŝi surmetintus la pervenĉan robon kongruan kun ŝiaj okuloj, kiu donis al ŝi tiel junan aspekton. Kaj rozkoloron sur la vangostoj kaj ankaŭ suno en la rideton.

Mi anoncintus al Fred, mia plej bona amiko – Mi prezentas al vi panjon, finfine mian patrinon ! Li ruĝintus kaj tuj enamiĝintus. Kun siaj blondaj haroj falantaj sur siajn rondajn ŝultrojn ŝi estis nerezistebla.



Sed ŝi ne havis la tempon iri al la lernejo, neniam renkontis miajn instruistojn. Estas plentempa laboro fariĝi bela, la parfuma bano, la haroj por bukli, gimnastiko kaj ungoj, kiujn oni devas verni per degradaĵo laŭ la vestoj de la tago. Foliumi belecajn revuojn, pririgardi la unuan sulkon, teni sin informita pri modo. Telefoni al amikinoj por ne resti ekstermoda, tamen sen malkaŝi siajn sekretojn, la dekoktaĵoj de nigra rafano por la vizaĝkoloro kaj la ovoblanko por streĉi la haŭton.

Mi fariĝis scioplana aŭskultante ĉe la pordoj, serĉante atenton,

rigardon, dolĉan vorton, aŭ ne. Atendante, kun turmentita koro, la neeraripovan pruvon, ke mi ekzistas por ŝi, almenaŭ iomete.

En la duonlumo de miaj duboj, suspektoj tordis mian konfuzan menson.

Ŝiaj vortoj ankoraŭ resonas : « ne restu ĉe miaj kruroj, vi dismaŝigos miajn ŝtrumpojn, iru prefere al via patro, li nenion havas por fari... ». Li jam estis emerita, kiam mi naskiĝis. Ĉar li ne havis idon kun sia unua edzino, li edziĝis al mia patrino en dua geedziĝo kun sola kondiĉo, ke ŝi faru al li infanon. Li estis ĉarmita de sia feino, kiel atestas la fotoj duonviditaj en la albumo, supre de la murŝranko. Mi foje faris punekspediciojn, kiam la apartamento estis senhoma, ĉar mia patrino butikumis kaj mia patro estis en sia briĝoklubo. Sur la fotoj ekvidebliĝas freneze enamiĝinta viro, kun nebula rigardo kaj beata rideto, dum ŝi staras flanke, alĝustigante la korsajlon de sia robo per seka mano.

Laŭ miaj kalkuloj la interkonsento estis rapide kontraktita. Ŝi ne volis lasi forkuri la kokinon je oraj ovoĵoj.

Mia patro estis riĉa. Tre riĉa kaj tre maljuna.

Mi restis sola filo, tio estas evidenta. Post mia naskiĝo mia patrino decidis dormi en aparta dormoĉambro kaj mia patro elverŝis siajn torentojn da amo sur sian heredanton, strangetan produkton de nematura adoleskantino kaj blankhara maljunulo. Mi estis nek infano de maljunulo nek ludkamarado.

Per ĉiuj miaj fortoj mi rifuzis tiun embarasan amon, la kurbigitan dorson, la blankajn harojn de tiu viro. Ĝis la tago, kiam li devis preni marŝbastonon por teni sin en ekvilibro. Tiam mi konis la honton. Kaj la honton pri mia honto.

Iun vesperon mi ne povis eviti la neeviteblan. La pordo de la instruistoj estis ŝlosita. Oni verŝajne rimarkis mian faron. Ĉar nenia problemevito eblis, mi devis prezenti mian genitoron al mia kamarado. « Jen mia avo », mi diris al Fred. En la malseketa rigardo de mia patro mi vidis pasi ombron, kiu esprimis la tutan suferon de la mondo, la mirigon, la seniluziigon, la malĝojon kaj ankaŭ la perfidon. Malrapide li forviŝis siajn skvamajn okulvitrojn per basko de sia ŝalo, li ridetis al Fred sen vorto, sed li neniam plu venis preni min el la lernejo.

La tempo pasis. Mia patrino trovis novan edzon pli junan kaj same riĉan. Ŝi forlasis nin ambaŭ, rifuzante, ke sub ŝia basko vivu idaro, eĉ se ĝi estas travidebla en ŝiaj okuloj. Kaj ni daŭrigis nian vojon inter viroj.

Fred opiniis mian avon « tre mojosa ». Lia rango en mia genealogia arbo malmulte gravis al li. La maljunulo “instruis al li multajn aferojn, li estis multe pli amuza ol liaj propraj prapatroj”. Fine mi ekrigardis tiun sinjoron, kiel li meritis : fonto de scio kaj pacienco. Kvankam li ne kuntiris min en senbridajn ekzercokuradojn, li instruis al mi ludi ŝakon, ŝati teatron kaj poezion, sciojn pri astronomio. Li malkovrigis al mi la mondon, unue realan, poste en la granda libro de siaj memoraĵoj, kiam lia sano malboniĝis. La belaĵojn de la universo, ties riĉecon kaj diversecon, la senlime grandan kaj la plej etan. La vivanton kaj la sanktecon. La videblan kaj la nevideblan. Li instruis al mi kiel aŭskulti per la koro kaj vidi per la manoj.

Li faris la viron, kiu mi fariĝis, igis min ŝati la vivon, ties bonajn kaj malbonajn periodojn. Lia voĉo iom eskapis, kiam li parolis pri la malplenaĵoj, mi certas, ĝuste kiam li mortis, ke li ankoraŭ pensis pri sia feino. Ni neniam revidis ŝin.

Kaj kiam mi pasas preter lernejo hodiaŭ, la koro al mi premiĝas pro bedaŭro kaj honto sed rapidege mi regas min denove kaj mezuras mian ŝancon, ke mi renkontis tiun viron. Mian patron.

Tiun mallongan rakonton aperintan en la retejo short-edition.com esperantigis Jean-Mary Simonet.




Ĉies Tero Nia.

Venusa umbiliko, amo de salato

Malmute konata sed ĉiam surpriza, tiel por la okulo kiel la papiloj, la venusa umbiliko (*Umbilicus rupestris*) ne povas lasi indiferanta. Ĝi indas esti respektate observata kaj plukata.

Infano, mi malmute havis okazon renkonti tiun mirindaĵon. Nur sur la malnovaj muroj el senmorteraĵ silicaj ŝtonoj de la altaĵoj superstarantaj Vichy, kie vivis miaj gepatroj, mi povis ilin admiri.

Mi kontentiĝis manĝeti iom da folioj pulporiĉaj, sukoplenaj kaj acidetaĵ. Nur iom poste mi malkovris ilian potencon « salatecan », abunde plukante ilin sur la ombraj kaj humidaj rokoj de Bretonio, de Korsiko aŭ de la Lionaj montetoj. Inter ili mi renkontis iujn de diversaj grandecoj, de dikeco de unu franko ĝis tiu de subtasoj. Kaj kun ili mi faris ĉiajn specojn de salatoj. Bonega bazo por la someraj kombinaĵoj, mi miksas la plej variitajn ingredienciojn – laktuko, tomato, kukumo, fromaĝo aŭ olivoj : ĉio mirinde miksiĝas. La Venusa umbiliko ofertas tiun kuniĝon de freŝeco, moleco kaj krakanteco, kiu ekvilibrigas la malavarecon de pli riĉaj pladoj. Mi miras, ke ĝi ne estas pli konata : estas vere unu el la plej bonaj plantoj por niaj someraj salatoj.



Pulporiĉaĵo, kiu konservas akvon

La simpla observado de la folioj de tiu kurioza planto klarigas ĝian nomon : ili estas rondaj, kun kaviĝo en la centro, tie kie kunligiĝas la petiolo sur la suba flanko. La elvoko de umbiliko, *umbilicus* latine (kiu egale signifas « eta cirklo ») estas evidenta. Ĉu ĝi estas tiel bela kiel tiu de Venuso ? La botanikistoj ĉiaokaze uzas la vorton umbilikita » por priskribi tiun folioformon. Ilia pulpodika flanko estas adaptiĝo al la kondiĉoj, kiuj regas en la aparta medio, kie kreskas la planto, kiu ebligas al ĝi stoki akvon, kiam pli daŭras sekeco – estas la sama principo adoptita de kakttoj en amerikaj dezertoj. La epiteto « *rupestris* » indikas ĝian loĝlokon sur la parietoj, rupes latine.


Unu el miaj preferataj ludoj estas delikate eltiri epidermon el umbilika folio, tio postulas tutcertan lertecon, kaj meti ĝin sur mian haŭton, kie ĝi algluiĝas. Pli ol amuziĝo, tio estas bona rimedo por helpi vundojn cikatriĝi aŭ mildigi brulvundojn... Fakte la planto agas, sajne, same kiel la famkonata aloo (aloe vera), kies ĝelo posedas kuracajn efikojn. Kaj malfacile estas uzi pli lokan rimedon !

Acidetaj folioj

Ĝi estas riĉa je mucilago, kiu donas al ĝi mildigajn povojn. Ĝia acideta gusto devenas el organikaj acidoj, kiuj akumuliĝas dum la speciala planta fotosintezo : oni parolas pri « acida metabolo krasulaca », de la familia nomo, la Kraculacoj. *Crassus*, latine, signifas « karnohava » kaj la plimulto de ĝiaj membroj fakte estas tiaj.

Amaraj floroj

Kiam la planto kreskas, vidiĝas je ĝia pinto unu aŭ pluraj tigoj starigitaj portantaj je sia bazo foliojn de malgrandigita amplekso kaj longa grapolo de flavetaj floroj, kelkafoje ruĝetaj. Estetikaj, tiuj infloreskoj estas malmulte plaĉaj por manĝi.



Ĝemelita fratino



Oni povus, konfuzi la umbilikon de Venuso kun la akva pelveto (*Hydrocotyle vulgaris*), kies folioj estas ankaŭ rondaj, sed pli maldikaj. Kaj tiu lasta vivas en la marĉoj aŭ eĉ en akvo. Plie ĝi estas ankaŭ perfekte mangebla.

RECEPTO

Krakfolioj kun juglanda saŭco

Preparado : 10 m

Por 4 personoj

- 1 salatujo da folioj plukitaj kun petiolo
- 1 soja jogurto aŭ vegetala natura deserto
- 2 supkuleroj da oliva oleo kaj unu citronsuko
- 1 manpleno da duonjuglandoj
- 1 pinĉopreno da salo

Krude tranĉu la foliojn de umbiliko de Venuso, lasante tute plenaj la plej malgrandajn.

Metu ĉiujn aliajn ingrediencojn en bovlon de roboto de kuirejo kaj miksu.

Servu la foliojn kovritajn per juglanda saŭco.

Tiun artikolon de **François Couplan** aperintan en « *Le Pèlerin* » de la 3a de julio 2025 esperantigis Jeannine Layseman.

YEESOOKYUNG (naskita en 1963)

Splitoj da vivo

Post rompiĝo, kion oni povas rekonstrui ? La skulptistino sudkorea Yeesoookyung provas respondi al tiu demando, kiu ŝajnas trapasi ankaŭ la historion de ŝia lando, ĉiam duonpartigita inter la Nordo kaj la Sudo. La artistino mem akordigas en sia vivo sentemon samtempe budhistan kaj katolikan. Alia paradokso, religia tiu, tamen, kiu ebligas al ŝi labori pri la temo de la homa deziro, tiel fragila, tiel kompleksa samtempe. Rigardante labori sian samnacionon ceramikiston Lim Han-Taek, fama pro la kvalito de siaj porcelanoj, Yeesoookyung konstatas, ke dum sia laboro, li memvole frakasas multajn kreitaĵojn post ilia kuirado, tuj kiam li vidas la plej malgrandan difekton. Deziro de perfekteco kaj de kvalito, certe ja honorinda, sed tio pridemandas la skulptistinon. Kun lia permeso, Yeesoookyung decidas kunpreni la porcelanajn fragmentojn. Pli poste, ŝi eklaboros kun gluaĵo kaj ora folio. Referenco al japana arto, *kintsugi*, kiu riparas la rompitaĵn ceramikaĵojn por redoni al ili ilian originalan formon, tamen stampitan de cikatro lumigita per oro. Sed la artistino pli progresas. Ne temas pri restarigo de tio, kio ekzistis antaŭe : ŝi preferas doni novan vivon al tiuj rompaĵoj kaj al tiuj porcelanaj splitoj. Nova formo, ronda, grasdika kaj plenplena aperas. La rompiĝo lasis lokon al nova vivo.

Tiun artikolon de Dominique Lang aperintan en la revuo « Le Pèlerin » de la 29a de januaro 2026 esperantigis Jeannine Layseman.

TRANSLATED VASE_2023
TVCIW 1 (2023). Splitoj da ceramiko, epoksia rezino, ora folio 24 karatoj. 161 x 74 x 76 cm. VIDEBLA en la sino de la ekspozicio « Koloroj de Koreio. Lumo pri nuntempa korea arto », en la korea kultura centro en Parizo ĝis la 29a de aŭgusto 2026.

